



# KONGA STELO

## Nyota ya Kongo



*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo)  
kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.*

## Ses junaj kongolandaj esperantistoj partoprenis en la ĉi-jara IJK



### Enhavo

#### **Front-paĝe :** Partoprenintoj de la 81a IJK, en Indonezio

|                                               |    |
|-----------------------------------------------|----|
| Redakcie .....                                | 2  |
| Esperanto-tago en Kinŝaso .....               | 3  |
| la 81a IJK, en Indonezio, raporto .....       | 4  |
| Penseroj de Rimedo .....                      | 6  |
| Granda populariga kampanjo de Esperanto ..... | 8  |
| Distribuado de lernejoj ilaroj .....          | 10 |

|                                          |    |
|------------------------------------------|----|
| E-movado en uvira, Suda Kuvuo .....      | 11 |
| Poemoj .....                             | 12 |
| Invitu la UK-on en 2027 aŭ en 2028 ..... | 14 |
| Vojaĝo de Esperanto-ateliero .....       | 15 |
| Neniu sekso superas alian .....          | 16 |
| Kafujo – Sumoo .....                     | 17 |
| Leciono pri la Svahila lingvo .....      | 18 |

#### **Dors-paĝe :** Le Congrès des Villes-pont, Fabelo pri Muso kaj Leporo

## Redakcie

Joel Muhire



Kvankam la esperanto-movado en nia lando (DR Kongo) estas en ŝrumpa stato ĉefe pro la premanta politika malsatbileco, tamen celkonsciaj esperantistoj ne dormas. Tion pravas du artikoloj kiujn vi trovos ĉi-numere, tiun de Ramazani Amisi Nanjira el Uvira kaj alian de Jackson Mafuila Mavomo el Kinŝaso.

En la antaŭaj numeroj (4a kaj 5a), la redakcio sciigis vin pri bona novaĵo, la edziĝo de la belgo *Ben Indestege* al la kongolandanino *Miriam Alliance Ingabire*. Ilia momenta restado en DR Kongo montriĝas avantaĝa por nia e-movado, ĉar ĉie kien ili metas la piedojn, ili vekas en preterpasantoj scivolemon pri Esperanto. En la artikolo de Jackson Mafuila Mavomo vi legos pli pri ilia propagando de Esperanto en Centra Kongo (Bas-Congo) kunhelpe de Jackson mem. S-ano Malekera Bonne Idée rakontas al ni pri siaj impresoj pri la ĉi-jara 81a IJK, okazinta en Indonezio, de la 9a ĝis la 16a de Aŭgusto 2025.

Konga Stelo interesas ne nur kongolandanojn! Ĉi-numere aperas denove artikolo de ĉina samideano Song Zhenyuan (Rimedo) pri Artefarita Inteligenteco (AI) kaj poemoj de Caterina Parca (Italio), tradukitaj el la Itala de Alessandra Maddella.

Kiel kutime, Joel Muhire prezentas al vi novan lecionon pri la ŝuahila. Bonan legadon!

**Konga Espero (KS)** estas trimonata informilo de DKEJO (*Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo*) eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.

**Redaktoro:** Joel Muhire

**Kontaktoj:** [joelmuhire0@gmail.com](mailto:joelmuhire0@gmail.com), Tel. +243 977 643 030

La retejo de KS : [https://uea.org/vikio/Konga\\_Stelo\\_Revuo](https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo).

**La estraro de DKEJO (2025-2028)**

**Prezidanto :** Waziwazi Grâce,

Tel. +243 976 413 837, rete: [dkejo@outlook.com](mailto:dkejo@outlook.com).

**Vicprezidanto :** Ramazani Nanjira, Tel. +243 981 137 264

**Sekretario :** Jofina Mungosy, Tel. +243 979 051 901

**Kasisto :** Ornella Idumba, Tel. +243 970 702 532

## Kiel sendi kontribuojn al Konga Stelo?

- ✓ Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.
- ✓ Se vi sendas tradukaĵojn, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fontinto!
- ✓ Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en format RTF al: [joelmuhire0@gmail.com](mailto:joelmuhire0@gmail.com) plej laste, je la fino de ĉiu tria monato.
- ✓ Viaj kontribuoj povas temi pri e-agado en via loĝregiono, poemoj, kulturo (manĝaĵo, vivmaniero, bredado, transporto, ktp), naturo, rakontoj, humuraĵoj, lingvoj, ktp.

## Koran antaŭdankon pro via(j) kontribuo(j)!

**DKEA:** Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio, fondita en 1963.

**DKEJO :** Demokratia Kongolanda Junulara Organizo, fondita en 1984.

**ILEI:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.  
[www.ilei.info](http://www.ilei.info).

Bonvolu subteni la redaktoran laboron : UEA-konto : **jmhr-a**.

# Esperanto-tago en Kinŝaso

Remond Mata – Kinŝaso

**L**a 26an de julio 2025 okazis Internacia Tago de Esperanto. DKEA, la DR Konga Landa Asocio rekomendas ke ĉiuj kluboj ĝin memorfestu en siaj respektivaj kunvenejoj.

En Kinŝaso KDPS-klubo kaj infana esperantogrupo de Matete kun iliaj gastoj sinjoro Ben INDESTEGE el Belgio kaj lia edzino sinjorino MIRIAM (el Norda Kivuo), festis en "Échangère de limete", tre plaĉa turisma loko.

Ili profitis viziti la plej altan turon de la ĉefurbo (200 metrojn alta) kaj la statuton de Patris Emery Lumumba, la unua ĉefministro en la historio de nia lando. Interesa akcepto de la loka gvidanto kiu klarigis al la esperantistoj pri la historio de la turo kaj la vivo de Patris E Lumumba. La esperantistoj profitis ankaŭ viziti la grandan salonon situantan je la teretaĝo de la turo en kiu oni trovas diversajn aranĝojn kaj kiu enhavas ekspoziciaĵojn. La geoficistoj de la loko ege miris, ke Belgo edziĝinta al kongolandanino parolas inter si en alia, tute ne



konata de ili lingvo, kiu estas nek la belga nek la kongolanda lingvo.

Je tiu sama okazo, sinjoro Remond Mata klarigis pri diversaj avantaĝoj de tiu moderna komunikilo Esperanto.

Notinde, ke la ĉeesto de la infanoj ege ĝojigis la gastojn. Sinjorino Miriam faris esperantan lecioneton al la infanoj. Bedaŭrinde la infanoj de Mongafula atendite tamen ne sukcesis alveni sufiĉe frue. Cetere same kiel la blinduloj. La etoso finiĝis per manpremoj kaj adiaŭaj vortoj.



*Kara leganto,*

*Ĉu vi estas kongolandano? Se jes, bone. Kunhelpu do florigi la e-movadon en DR Kongo partoprenante en poresperantaj klubaj aŭ asociaj agadoj, kaj ne forgesu raporti pri tio al la redakcio de Konga Stelo! Viaj spertoj povas sen-dube avantaĝi al aliaj por pli energie aktivi en la movado.*

*Ni tre ŝatus ankaŭ legi de niaj eksterlandaj legantoj!*

**Redakcio.**

# 81a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO: *SKIZA RAPORTO, IMPRESOJ KAJ KONATIĜOJ*

## Malekera Bonne Idée – Uvira

**I**nternacia Junulara Kongreso estas evento organizata ĉiujare de TEJO por ĉefe junaj esperantistoj, kiuj aĝas inter 18 kaj 35 jarojn, el ĉiuj partoj de la mondo kaj ĝi ĝenerale okazas fine de Julio kaj komence de Aŭgusto.



TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) estis kreita en 1938 de nederlanda esperantista paro ELISABETH VAN VEENENDAAL kaj WILLEM VAN VEENENDAAL kun la celo popularigi Esperanton, ĝia nomo komence estis TJO (Tutmonda Junulara Organizo) kaj en 1952 ĝi fariĝis TEJO. Ĝi estas junulara sekcio de Universala Esperanto Asocio (UEA) kies celoj estas disvastigi la uzadon de Esperanto, kontribui al la evoluo de Esperanta kulturo, agadi por la solvo de la lingva problemaro en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon, plifaciligi ĉiuspecajn spiritajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo, ktp...

## Kvin-foja IJK en Azio

La 81a IJK estas la kvinfoja en Azio ! Ĉi-jare la IJK okazis en Indonezio, lando situanta en la orient-suda parto de la kontinento, de la 9a ĝis la 16a de Aŭgusto 2025. La unua IJK en Azio okazis en 2000, en Hong Kongo, la dua en 2007 en Hanojo, en Vjetnamio, la tria en 2012, ankoraŭfoje en Hanojo, la kvara en 2013 en Nazareto, en Israelo.

La 81an IJK partoprenis proksimume 140 esperantistoj el 33 landoj. La lando kun la plej multaj partoprenintoj estis Indonezio. Aliaj reprezentitaj landoj estas : Japanio, Hispanio, Aŭstralio, Katalunio, DR Kongo, Orienta Timoro, Britio, Barato, Usono, Nderlando, Slovakio, Singapuro, Nederlando, Slovakio kaj Madagaskaro. Multaj afrikaj junuloj kandidatiĝis je la konkurso *Partoprenu IJK-on* sed ne ĉiuj gajnis, krom s-anoj Malekera Bonne Idée el DR Kongo kaj Abraham Korir.

Mi gvidis multajn programerojn dum IJK:

**Literaturan programeron :** mi prezentis miajn poemojn, kiuj antaŭ 3 monatoj aperis en la dua numero de la revuo LITERATURA VIVO redaktata de Erika Godó. Ĝi estas legebla ĉi tie <https://www.literaturavivo.com/>.

**Muzikan programeron :** Mi kantis miajn kantojn, kiujn mi faris el miaj jam verkitaĵoj poemoj. Vi ankaŭ povas spekti kelkajn ĉe: [www.youtube.com/@malekeracimanukaboneidee615](https://www.youtube.com/@malekeracimanukaboneidee615).

Alia granda programero, kiun IJK-organizantoj taskigis al mi gvidi estis **Afrika diskejo** dum kiu homoj forgesis iliajn problemojn, forĵetis melankolion kaj malkrovis la Afrikan kulturon kundancante dum mia kantado. La kantojn kiujn mi prezentis mi elektis laŭ la landoj, kelkaj estas de famaj muzikistoj el DR Kongo, aliaj de famaj muzikistoj el Kenio, Burundo, Tanzanio, Sud-Afriko, ktp...

Oni povas diri, ke Azio estas kontinento kun la unika ŝanco gastigi alifojan IJK-on en la estonteco.

### Etna popolo, kiu esperas je la protekto de diino



Okazis ankaŭ antaŭ-, dum- kaj post-kongresaj ekskursoj el kiuj mi partoprenis nur unu post-kongresan ekskurson. La kongreso finiĝis la 16an de Aŭgusto kaj kelkaj en la sama

tago komencis reflugi hejmen kaj aliaj reflugis la antaŭlastan tagon de IJK. Marde la 19a de Aŭgusto kelkaj esperantistoj ekskursis al la vilaĝo *Baduy luar* situanta en la suda provinco de *Banten* en Java-insulo, kie ni tranoktis kaj amuziĝis kaj spertis multon.

La baduj-anoj (popolo de baduy luar) havas propran kulturon malsaman de aliaj popoloj de aliaj insuloj: ili parolas malsaman lingvon, la *Sundan*, malsaman lingvon ol tiu, kiu estas parolata en Ĝakarto, Bogor, Tanah abang, regionoj, kie oni parolas la Indonzian lingvon. Kaj ilia kulturo tre malsimilas al tiuj de aliaj provincoj aŭ de aliaj partoj de la lando.

### Kion devas kaj ne devas fari la Baduj-anoj:

Junuloj en Baduy en la aĝo de 17 devas edziĝi. La junulo, kiu planas edziĝi devas unue havi jam sian propran kampon, tio estas nepra kondiĉo. Alia surpriza afero, la Baduj-anoj havas sian diinon, kiu helpas protekti kampojn kontraŭ la malsanoj, kiuj atakas la plantojn. Tiu diino ankaŭ helpas protekti la baduj-anojn kontraŭ malbonefikaj aferoj. La nomo de la diino estas **LEWISTRI**.

La infanoj de baduy luar ne rajtas studi aŭ iri eksteren de la vilaĝo ne tial ke ne ekzistas ĉirkaŭ la vilaĝo lernejoj ŝtataj sed tial ke tio estas unu el la reguloj de la vilaĝo, kiujn ĉiu devas respekti. Kion mi ŝatis kaj mirigis min estas la amo kiun sentigas al ĉiuj eksterlandanoj la baduj-anoj. Ili estas amikiĝemaj, ili amas unu la aliajn. Kiam domo de iu el ili fariĝas kaduka, la homoj fortaj kunvenas kaj helpas kunkonstrui ĝin kunlabore kun la posedanto de la domo.

### Malbona klimato por eŭropaj esperantistoj

La klimato estis malfavora al eŭropaj geesperantistoj, kiuj grandparte malsaniĝis. Ŝajnis laŭ mi, ke tio estis kaŭzita de la loka akvo kaj manĝaĵo.

### Esperanto ĉie, Esperanto eĉ en la aviadilo

Mia vojaĝo de Afriko al Azio estis plensukcesa kaj fruktdona. Dum mia vojaĝo mi povis esperantistigi du viciajn amikojn. Dum mi legis la libron Ĵim la migrulo en la aviadilo, iu virino



legis libron Petit Pays, kiun mi ja konas. Tiam mi demandis se ŝi aĉetis ĝin en Afriko aŭ venis kun ĝi el Eŭropo kaj reiras al Eŭropo kun ĝi, ŝia respondo estis tio ke ŝi aĉetis ĝin en Eŭropo. Ŝiavice ŝi demandis al mi kiun libron mi legas kaj en kiu lingvo ĝi estas, ĉar ŝi vidis vortojn, kiujn ŝi ne komprenas! Por mi estis oportuno alparoli ŝin pri Esperanto. Ĉu vi konas Esperanton aŭ ĉu vi iam aŭdis paroli pri ĝi, mi demandis. Ŝia respondo estis jes kun dubeto. Mi klarigis kaj al ŝi kaj al ŝia alia amiko kaj ili estis ĝojaj. Ili prenis miajn adresojn kaj mi donis al ili nomojn de retejoj kie ili povas lerni Esperanton memstare kiam mi forestas.

### Intervjuiĝo por la revuo kontakto dum IJK

Mi intervjuiĝis de kara Ikvero dum la kongreso kaj tio estis ankaŭ unu el miaj kontribuoj por la revuo kontakto de TEJO. Dankon al Ik-

vero pro la intervjuado kaj gratulon pro lia elekto kiel vicprezidanto de TEJO.



**Malekera Bonne Idée** estas juna esperantisto el Uvira (Suda Kivuo), DR Kongo. Li ŝatus legi viajn viajn komentojn pri sia artikolo.

[malekeracimanukabonneidee@gmail.com](mailto:malekeracimanukabonneidee@gmail.com)

# Penŝeroj de Rimedo

## Song Zhenyuan - Ĉinio

**L**astatempe mi revivigas la ideon uzi Esperanton por registri mian vivon. Mi daŭre sentas apartenon al nia lingvo, ĉiam pura kaj sincera ĉar kvazaŭ sekreta por ni samideanoj. Parolante pri la vorto “samideano”, mi memoras *profesoron Li*, kiu en la kursoj ĉe Zaozhuang-a Universitato, en Shandong-provinco de Ĉinio, instruis al ni la vortformadon kaj tiun belan komunan nomon inter Esperantistoj—homoj kun la sama ideo. Mi nun ĵus malkovris, ke *AI* povas uzi nian lingvon. Aldone, mi ĉiam sentas, ke nia lingvo estas plena de spirito kaj vivo, kiu donas al mi grandan fieron kaj afablecon. La unikeco de Esperanto ne nur kuŝas en ĝiaj sonoraj signoj, sed ankaŭ en la komunumo, kiu parolas kaj

vivas ĝin. Ĉiuj samideanoj, kiujn mi renkontis, montris al mi varmecon kaj konsideremon, sen atentado pri naciaj limoj aŭ kulturoj. Tio pravas, ke Esperanto vere havas la potencon unuigi homojn, superante diversajn obstaklojn. Kaj justas tiu espero, kiun nia lingvo portas, ke ĝi estos pli kaj pli vaste uzata en la estonteco. Ho ve! *Deepseek*, *Doubao*, *ChatGPT ktp.* ankaŭ uzas nian lingvon, eĉ je la nivelo de C-2!

Mi memoras, ke antaŭ duona jaro, mi demandis al *Deepseek* kiel ĝi rigardas Esperanton. Ĝia respondo similis al tiu de homoj, nur eble eĉ pli bone formulita. *Deepseek* diris al mi, ke Esperanto estas kiel kvieta, sed rezistema ponto, kiu konektas la

kor-batojn de idealistoj. Eble ĝi neniam fariĝos brua strato, sed ene de ĝiaj fendoj prosperas poezio, muziko kaj brakumoj trans limoj. La obsedo pri “lingva egaleco”, dispremita de la konkeranta angla, malkaŝas certan romantikon en sia fragileco – tre simile al iu, kiu obstine plantas florojn por printempo eĉ sciante, ke rozo velkos. La realo estas severa: tradukado pere de AI malkonstruas la lingvan Babelturon kaj ekonomia hegemonio jam delonge kronis en la angla la plej fortan internacian lingvon. Tamen la estonteco de Esperanto ne kuŝas en praktikeco, sed en ĝia daŭra rolo kiel spegulo, kiu reflektas la nostalgion de la homaro por “senradika lingvo”. Kiam vi malfermas polvokovritan ekzempleron de *La Verda Stelo* en kafejo, vi subite rimarkos, ke ĝia ekzisto mem estas milda ribelo kontraŭ instrumenta racio. Ne bedaŭru pri Esperanto, ĉar ĝi konservas pli ol gramatiklibron: ĝi estas arkeologia restaĵo de la klopodo de la homaro racie rekonstrui la Babelturon. Dum ekzistos homoj, kiuj uzas ĝin por verki ampoemojn, kanti rokmuzikaĵojn, aŭ instrui al siaj infanoj kiel unuan vorton la belajn sonojn de “samideano”, ĉi tiu ponto neniam vere kolapsos. Finfine, la mondo



bezonas idealojn, kiuj povas malsukcesi, sed neniam kapitulaci, same kiel la nokta ĉielo bezonas tiujn mortintajn, sed ankoraŭ brilantajn stelojn. Kiam mi finas la tradukadon de tiu ĉi paragrafo, mi fine komprenas la ĉinan interretan memeon: “Kie estis viaj nunaj kondiĉoj tiam?” Mi skuis la kapon kun senhelpa rideto pensante pri niaj antaŭaj tempoj, la universitataj tagoj kiam ni faris tiom multe kun tiom malmulte: “Ni nur havis unu Esperantan vortaron—ni nomis ĝin ‘Wang Dian’, aŭ simple “hura” en Wechat. Sed nun... ho, nun eĉ AI-tradukilo ekzistas!”

Do, kiam AI tiel senpene spertas kaj uzas nian lingvon, mi kvazaŭ malkovras, ke eble la signifo de Esperanto kuŝas inter vi kaj mi, pli ol en la profitcelaj agadoj farataj sub la standardo de Esperanto mem aŭ en la aroganteco de alia speco de lingva hegemonio. Kiam vi legas ĉi tiun tekston en nia komuna lingvo, Zamenhof en iu paralela universo eble ridetas, kaj samideanoj ĉie en la mondo eble same ridetas—tio estas ja la signifo de Esperanto, paco kaj amikeco, ĉu ne?

*Sendis tiun artikolon al la redakcio :  
**Alessandra Madella – Italio.***

## Korespondpeto

**Buda Rukwabuka Kazingu** deziras korespondi. Li estas komencanto el Uvira, DR Kongo.

Li uzas ĉefe fejsbukon kaj vacapon (+243829757467).

**Jonathan Ndayishimiye**, naskiĝinta en 1985, deziras korespondi. Li estas iama estro de Bunagana Esperanto Amikaro, tamen pro la milito li loĝas momente en Nakivale kiel rifuĝinto, kune kun sia familio.

Rete : [jonathanndayishimiye097@gmail.com](mailto:jonathanndayishimiye097@gmail.com)

# Granda populariga kampanjo de Esperanto



## Jackson Mafuila Mavomo – Kinŝaso

**A**ntaŭnelonge okazis Granda populariga kampanjo de Esperanto en Matadi, DR Kongo.

Unue, sciindas ke, la 29-an de Oktobro 2023, la Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) ellaboris projekton "Vekiĝo" por pli-fortigi popularigon kaj instruadon de Esperanto en DR Kongo. Dume, *Sum-Internacia*, ne-registara disvolva organizo, kies sidejo estas

en Matadi, ankaŭ puŝita de la Unesko-Rezolucioj (*Montevideo 1954*) favore al Esperanto, iam konsentis kunlabori kun DKEA precipe ĉar la popularigo kaj instruado de nia lingvo estas klare menciitaj en la statutoj de tiu organizo.

Dum la kunveno de la 29a de oktobro 2023, s-ro Guy Roger Ileka, la nuna prezidanto de DKEA, konfidis al la ĝenerala sekretario la tas-

kon iri al Matadi por organizi Esperanto-kursojn. Bedaŭrinde, revenante hejmen, akcidento okazis, kaj li trovis sin en hospitalo dum preskaŭ 2 jaroj. Ĉar li estas aktiva membro de Sum-Internacia, la Matadi-anoj decidis atendi lin.

Ni estis agrable surprizitaj kiam belga samideano, nome Ben Indestege, alveninta en DR Kongon por edziĝi kun konga esperantistino Miriam Alliance Ingabire, konsentis akompani nin en ĉi tiu projekto kune kun sia edzino.

Antaŭis ilian agadon renkontiĝo kun Esperantistoj de Kinŝaso, antaŭ ol pasigi tutan tagon en la sidejo de Konga Ligo de Blindaj Esperantistoj, kune kun s-ro Jackson. De tiam, ni celis konkeri Matadion, Boma kaj Muanda, ĉe la okcidenta parto de la lando. Jen kiel, dank'al s-ro Anderson Kalemba Mbilu, la prezidanto de *Sum-Internacia*, ili semis la grenon de Esperanto en ĉiujn sociajn tavolojn.

Ĉar la promocio kaj instruado de la Internacia Lingvo estas registritaj en la Statuto de *SUM* ekde la jaro 2020, la Komitato de ĉi tiu Asocio organizis tre gravajn kunsidojn. En rekorda tempo, ni estis ricevataj de preskaŭ ĉiuj aŭtoritatoj de Matadi. La buroestro de la Provincestro, la Provinca Asembleo, la Komitatoj de Urbaj Asembleoj, la Universitatestro de Matadi UNIMAT, iuj el la plej gravaj komercistoj de la provinco, ktp, petis la Konglandan Landan Asocion organizi Esperanto-kursojn en Matadi, Boma kaj en la marborda urbo Muanda. La vicprezidanto de la Universitato de Matadi, faris al ni la honoron inviti nin al sia persona



loĝejo, ĉiufoje kiam ni estas en la urbo. La aliaj



tavoloj de tiu urbo ne estis forgesitaj.

La Centro SUM-Academia, kiu prizorgas edukadon de forlasitaj junuloj por igi ilin utilaj al la socio, ankaŭ akceptis Esperanton. La ĉeesto de la belga-kongolanda paro Ben kaj Miriam, kiun ni tutkore dankas, estis samtempe agintoj kaj atestantoj de la evento. Post tiu restado en Matadi, ni iris al Boma kun la prezidanto de SUM, por kune vekti la jam ekzistantajn klubojn. Post tiu maratono, mi akompanis Ben kaj Miriam al Muanda, kie ili organizis kunvenon de nur 3 esperantistoj jam ekzistantaj tie. Estis mirinda tago ĉe la Atlantika Oceano. Kvin novuloj aliĝis al la kurso. Nia vojaĝo tamen estis interrompita ĉar denove la akademiaj aŭtoritatoj de la UNIMAT havis urĝan bezonon denove renkonti nin. Ĉi-foje, ni kune esploris la fareblecojn kaj kalendaron de la projekto. Do, la sukcesoj de ĉi tiu kampanjo estis pli grandaj ol atendite! Kaj do, la unua, tiel nomata eksperimenta, paŝo de la projekto komenciĝos la 6-an de decembro 2025, ĉe la SUM-akademia Centro en Matadi, en ĉeesto de la diversaj aŭtoritatoj de la urbo. La Universitato de Matadi estos reprezentata de s-ro Thomas Mundele Kiakakua, la vicprezidanto de la universitata Administrantaro. Kaj estos por ni la okazo anticipe festi la Zamenhofan tagon. Sed, ĉar ni evidente bezonos multe pli da manlibroj ol komence planite, ni petas ĉian helpon de ĉiu. Ĉu rekte aŭ nerekte, kontaktu S-rojn Guy Roger Ileksa<sup>1</sup>, prezidanto de DKEA,

kaj/aŭ Anderson Kalembe Mbilu<sup>2</sup>, prezidanto de SUM.

Post tiu turneo, la 8an de septembro 2025, s-ro Ben Indestege kaj lia edzino Miriam, kune kun s-ro Jean-Pierre Lungkisa, estis akceptitaj en la sidejo de la Nacia Komisiono de Unesko, kie ili estis tre sincere gratulitaj pro ilia partopreno en la promociado de



Esperanto en nia lando. DKEA profitas la okazon por sincere danki la Nacian Komisionon de Unesko en Kongo pro la amika kunlaborado kun nia landa Asocio.

La UNESCO-komisiono ankaŭ invitis partopreni la venontan Unesko-Konferencon la 30an de oktobro 2025 en Samarkando, Uzbekio.

Ĉiuj pliaj informoj estos komunikitaj al vi kiel eble plej baldaŭ.

**Notoj.**

(<sup>1</sup>) Prezid. de DKEA: "[ilostella@gmail.com](mailto:ilostella@gmail.com)"

(<sup>2</sup>)prezid. SUM: "[andersonmbilu@gmail.com](mailto:andersonmbilu@gmail.com)"

## Distribuado de lernejoj ilaroj

**Moise Byamungu Mihigo – Bukavu**

**L**a 14-an de aŭgusto 2025, la asocio COPROFER (Komitato por la Antaŭenigo de Virinoj kaj Infanoj en Kamparaj Areoj) lanĉis donac-peton pri lernejoj ilaroj por la infanoj (orfoj) sub ĝia zorgo. Ene de tri semajnoj, la asocio sukcese kolektis 7 skatolojn da kajaraj, 3 skatolojn da skribiloj kaj 80 liniilojn.



La 10-an de septembro 2025, Coprofer distribuis ĉi tiujn ilarojn al almenaŭ 80 infanoj. En mesaĝo de dankemo, la Kunordiganto de COPROFER, Moise Byamungu Mihigo, dankis ĉiujn malavaraĵajn homojn, kiuj subtenis la sukceson de la projekto: "Ni estas tre dankemaj kaj dankas gesinjorojn Francisco Gil Sarrión,

Aleks Kadar, Anna Lowenstein, la asocion AVE prizorgatan de sinjoro Manfred kaj anoniman donacinton el Hungario." Danke al vi, ĉi tiuj infanoj povos lerni. Ne estis nur simpla gesto, kiun vi faris por nia asocio, sed nobla kaj heroo gesto, kiu meritas premion. Vi estas herooj por ĉi tiuj infanoj kaj por nia asocio. Estu miloble benitaj, li diris. Estis granda ĝojo kaj plezuro por ĉi tiuj infanoj kaj la tuta asocio ricevi ĉi tiujn materialojn.

Notindas ke, *COPROFER* estas neprofitcela asocio de esperantistoj el Bukavu, fondita en 2004, kiu principe zorgas pri virinoj kaj infanoj (orfoj) el Suda Kivuo, Demokratia Respubliko Kongo. Ĝi havas propran orfejon en Panzi/Bukavu. Ĉiujare ĝi petas donacojn por aĉetado de lerneaj ilaroj por la orfaj lernejanoj. Krome, la asocio pluvivas kaj plenumas siajn agadojn danke al ankaŭ malgrandaj donacoj de bonvolaj homoj.

Por pliaj informoj, vizitu la Facebook-paĝon de la asocio "Coprofer asbl" aŭ kontaktu: Rete : [coprofer.asbl@gmail.com](mailto:coprofer.asbl@gmail.com), vacape : +243 971357598.



## Esperanto-Movado en Uvira, Suda Kuvuo

Ramazani Amisi Nanjira - Uvira

**L**a e-movado en Uvira lastatempe ŝrumpis pro diversaj kaŭzoj, i.a foriro de kelkaj famaj esperantistoj el tiu urbo, ekzemple Dankon Kwibe nun longanta en Burundio; Jérémie Kapunu nun longanta eksterkontinente (Kanadio) kaj tiel plu. La alia, eĉ pli grava kaŭzo estas perturbigo de la sekureca situacio pro diversaj armitaj ribelgrupoj en mia provinco. Do, malfacilas agadi por Esperanto en tia situacio.

Malgraŭ tiu ĉi malpaca situacio, nuntempe kelkaj junaj esperantistoj de Uvira decidis revivigi kaj savi la movadon ĉar alie ĝi komplete malaperus el tiu Urbo. Nekontesteble, antaŭ kelkaj jaroj, tiu urbo fortis e-movade; funkciis Esperanto-lakttrinkejo, bazlernejo en kiu Esperanto estis unu el la lernobjektoj. Tiu lernejo temas pri LA REFORME, kies muroj estis farbitaj verdokoloro, kiel simbolo de la paco kaj ĉe la enireja muro kaj pordego, la esperanta flago.

### Akademio Sporta de Esperanto

Por denove videbligi Esperanton kaj allogi novulojn al nia kurso, nia klubo CAPEH kreis futbalan Esperanto-teamon, *A.S Esperanto*. Ni havas aliajn revojn pri promociado de Esperanto en Uvira sed niaj financaj rimedoj estas

limigitaj por povi efektiviĝi ilin. Nia futbala teamo bezonas futbalistajn ŝuojn, jam ĝi havas du piedpilkojn kaj verdajn e-uniformojn.

### Instruado de Esperanto

La kurso komenciĝis sabaton, la 20an de Septembro 2025 ĉe *Centre d'Appui pour la Promotion de l'Espéranto et l'Humanisme (CAPEH)*. Ni ne ankoraŭ havas esperantan flagon kies utileco estas necesa okaze de diversaj poresperantaj renkontiĝoj.

Ni alvokas ĉiujn esperantistojn de Uvira pri kunlaborado en nia lukto por redoni al nia urbo ĝian antaŭan esperantan aspekton kaj promocii homaranismon dum tiu ĉi malfacila periodo, kiun nia urbo kaj ĝenerale nia lando malgaje trapasas.



# Poemoj

*Poemoj de Caterina Parca (Giorgia Albertelli, Italio), tradukis el la Itala Alessandra Madella, Italio*



## 1 MI EMUS

Mi emus instrui al vi  
silente aŭskulti,  
mallaŭte paroli  
kaj mallonge kaj profunde spiradi.  
Mi emus instrui al vi  
vundeblecon  
por igi vin humila.

Mi emus instrui al vi percepti  
la tuton ene de vi  
por igi vin forta.

Mi emus instrui al vi  
ke ne estas malfacile kuraĝe plonĝi  
sed havi la forton daŭre naĝadi.

Mi emus instrui al vi  
ke tio devas neniam  
forpreni de vi  
la volon klopodi.

*(El la kolekto "Perloj per poŝto").*

## 2 ĈU EBLE AMO MIA

Ĉu eble, amo mia,  
vi havis  
en kelkaj momentoj  
la impreson,  
ke mi malmulte zorgas pri vi?

Ĉu eble, amo mia,  
tro malofte  
mi skoldis vin,  
laŭte vokante vian nomon,  
kiam vi ludis en la placo?

Aŭ ĉu eble, amo mia,  
mia malatento  
pri viaj vestaĵoj  
kaj pri la haroj  
pensigis al vi  
kelkfoje,  
ke mi ne zorgas pri via figuro?

Eble estas tiel  
Sed mi ne pardonpetos al vi pro tio.  
Mi nur pardonpetos  
se en kelkaj momentoj  
vi sentis min malproksima,

Se tro malofte  
mi sentigis al vi  
kiom grava vi estas

Se en iu maniero,  
en iu momento,  
mi malaltigis  
vian splendan personecon

Se eĉ unu fojon

kiam vi serĉis min  
mi ne estis tie

### 3 INFANO DE TURKA MIELO

Kiel mi povas klarigi  
el kiom da dolĉeco vi estas farita  
kiam vi atendas antaŭ la vendejo  
rekta, sur viaj sveltaj kruretoj  
envice, por aĉeti la lakton.

Kaj mi vidas vin de la fenestro,  
kun via blonda kapeto,  
plena je pensoj kaj miremoj  
kaj je la deziro helpi panjon.  
Iom hezitema, sed tre atenta  
Rigardi tion, kio estas ĉirkaŭe,  
vi tenas la okulojn bone malfermitaj.  
Tiuj du okuloj kien ŝajnas  
falinta la tuta bluo de la ĉielo.

Kaj kiel mi povos iam danki Dion sufiĉe  
pro tio, kion li donis al mi,  
infano de turka mielo.  
Pro la ĝojo kaj la devo helpi vin  
serĉi la vojon kreski;  
por la honoro kaj la peno

lasi vin sole trairi ĝin iun tagon.

(El la kolekto "Perloj per poŝto").

### 4. LECIONOJ DE STILO

*La pudoro de miaj malfeliĉoj*

Pro pudoro de miaj malfeliĉoj  
kaj pro bonedukiteco.  
Kaj pro la natura respekto  
kiun mi havas pri doloro

Pro mia senĉesa zorgo  
gardi en mi mememocion  
kaj pro la forto, kiu subtenas min.

Pro la povo de rideto  
kaj ĉar afablo ĉiam naskas afablon.

(Leginte romanon de la itala verkisto Giuseppe Tomasi di Lampedusa).

### LETERO EL 1996

Mi hazarde trovis leteron de la iama prezidanto de la Zairia Esperantista Junulara Organizo, interesege! Esperantistoj el la jaroj 2000-aj ŝatus ekscii pli pri la iama zairia e-movado. Verku ion pri tio se vi estas esperantisto el tiu epoko. Mi kopias la mesaĝon de tiu letero por vi:

**28.10.1996**

*Estas por mi granda ĝojo esti gastigita ĉe vi. Kaj tio daŭre tondras en mia memoro. Mi petas al vi plufaron. Esperanto certe pravas ke ĝi estas ponto inter popoloj de diversaj lingvoj. Nur vi kaj mi povas sukcesi la idealon de nia kara Zamenhof por ke regu egaleco en lingva medio.*

**Crispin Niansi**

**Prezidanto de ZEJO, Zairia Esperantista Junulara Organizo.**  
B.P 95 11 KIN 1  
KINSHASA - ZAIRE.

28/10/1996

*Estas por mi granda ĝojo  
esti gastigita ĉe vi.  
Kaj tio daŭre tondras en mia  
memoro. Mi petas al vi  
plufaron. Esperanto certe pravas  
ke ĝi estas ponto inter popoloj  
de diversaj lingvoj.  
Nur vi kaj mi povas sukcesi  
la idealon de nia kara  
Zamenhof por ke regu egaleco  
en lingva medio.*

*Crispin Niansi*  
*[Signature]*  
Prez. de ZEJO  
Zairia Esperantista Junulara  
Organizo.  
B.P. 95 11 KIN 1  
KINSHASA - ZAIRE

# Invitu la Universalan Kongreson en 2027 aŭ en 2028

## El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

**P**ost Burno (2025) kaj Graco (2026) la sekvaj urboj, kiuj gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto (UK), estas ankoraŭ nekonataj kaj la Estraro de UEA varme bonvenigas kandidatiĝojn por ambaŭ jaroj 2027 kaj 2028. Kandidatiĝoj (kaj eventualaj demandoj pri la temo) devas alveni al la Kongresa Fakto de UEA pere de la retpoŝtadreso [kongresoj@co.uea.org](mailto:kongresoj@co.uea.org).

La fakto, ke jam estas Landa(j) Asocio(j), kiuj formale kandidatiĝis por tiuj jaroj ne malhelpas, ke aliaj kandidatoj prezentiĝu. Estas prefero, ke en 2027 la UK okazu ekster Eŭropo kaj en 2028 denove en Eŭropo, ĉiam en regiono, kie en la proksima pasinteco ne okazis UK, sed ĉiuj kandidatiĝoj bonvenas kaj la Kongresa Fakto analizos ĉiujn eblojn.

La kandidataj urboj prefere havu aktivan kaj harmonian movadon, malmultekostajn kaj taŭgajn kongresajn ejojn, bonan infrastrukturon (urban transporton, manĝejoj, hotelojn, gastejojn k.a.), apogon de la lokaj instancoj kaj registaro, kaj ili estu turisme allogaj kaj facile atingeblaj. Kandidatoj devas detale koni la Kongresan Regularon, kiu legeblas en la retejo de UEA ĉe [https://uea.org/teko/regularoj/kongresa\\_regulano](https://uea.org/teko/regularoj/kongresa_regulano).

La limdato por sendi la kandidatiĝojn por gastigi UK-on en la jaro 2027 estas la 15-a de oktobro 2025 kaj por la jaro 2028 la 31-a de decembro 2025.

Reprezentantoj de la Kongresa Fakto devas viziti la kandidatajn urbojn por kontroli la lokajn kondiĉojn kaj raporti pri tio al la Estraro de UEA. Laŭregule tiuj vizitoj estas principe plene financataj de la invitataj urboj/landoj kaj kandidatoj devas esti pretaj akcepti la reprezentantojn fine de 2025 aŭ komence de 2026.

Trovu antaŭajn Gazetarajn Komunikojn en la retejo de UEA: [uea.org/aktuale/komunikoj](https://uea.org/aktuale/komunikoj)



# Vojaĝo de Esperanto-ateliero : publika rakonto ĉe la Grande Saline

**Desbrieres Emmanuel – France**

**A**nais, Coline, kaj Gwendoline prezentis sian vojaĝon (de la 30a de marto ĝis la 4 avril 2025) ĉirkaŭ Alpoj nome de siaj samklasanoj. La Grande Saline de Salins-les-Bains, tutjara partnero de nia projekto, organizis la Nokton de la Muzeoj sabate, la 17-an de majo. Tiam estis ŝanco por la gimnazianoj dividi siajn spertojn. Per kelkaj vortoj, ili povis dividi tion, kion ili lernis el tiu aventuro. Ĝi estis okazo pripensi niajn renkontojn kun virinoj, kiuj estas pacigistoj. Ni renkontis Micheline Chateau en Gray (Francio) ĉe la Nacia Esperanto-Muzeo; en Vieno (Aŭstrio) Bertha von Sutner, la unua virino kiu ricevis la Nobel-premion pri paco; Elda Doerfler en Triesto; kaj Norma Cescotti en Trento (Italio).

La oldaj damoj parolis pri sia engaĝiĝo en ĉelimaj urboj, kiuj estis la loko de tiom da tragedio dum la 20-a jarcento. Sed kion la gelernantoj aparte memoris estis ilia dinamismo kaj energio. Estis realvivaj lecionoj, kiujn la gelernantoj neniam forgesos, krom la tutaj scioj tiel transdonitaj tra generacioj.

Kaj tio ne estas ĉio; nia vojaĝo estis tiel riĉiga.

La gelernantoj havis diplomatan mision. Ili alportis duoblajn dokumentojn konfidentajn al ili de la Nacia Esperanto-Muzeo al Bernhard Tuidor por konservado ĉe la Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Inter tiuj dokumentoj estis trezoro: la unika konata afiŝo de la 1-a Monda Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Boulogne-sur-Mer en 1905. Mi-

rinda kontribuo al la konservado de nia heredaĵo.

Ni ankaŭ vizitis Vienon danke al nia ĉiĉerono: Franz-Joseph GEIDE, viena esperantisto.

Sed la kulmino de la prezento estis la malkovro pri malgranda urbo, vera ĝemelo de Salins-les-Bains. Idrija en Slovenio listiĝas ankaŭ kiel Monda Heredaĵo de UNESKO pro la minado, ekde la Mezepoko, de rara kaj altvalora mineralo: hidrargo.

Ĉi tiu vojaĝo ankaŭ malfermas novan vojon: konstrui rilatojn kun la mezlernejo en Trento, kiu gastigis nin... Sed tiu estas alia historio...

Ni dankas ĉiujn partnerojn kaj donacantojn, kiuj ebligis ĉi tiun projekton.



## Rakonto: Neniu sekso superas alian, ambaŭ samvaloras

**Bernard Gnancadja – Benino**

**T**ogbe estas la estro de mezklasa familio. Li havas la rimedojn por provizi la bezonojn de sia tuta familio. Li estas bonega farmisto konata de la tuta vilaĝo Kondji. Li tute ne kuraĝigas la edukadon de siaj filinoj sed multe pli interesiĝas pri knaboj pro diversaj kialoj.

Por ĉi tiu viro, sendi knabinon al lernejo estas kiel ĵeti monon tra la fenestro aŭ kiel verŝi akvon sur la dorson de anaso. Laŭ li, tre ofte knabinoj en lernejo gravediĝas kaj finas sian vivon kun siaj edzoj. Togbe vidas en la edukado de siaj filinoj fonton de mon-malŝparado.

En lia familio de ok infanoj, el kiuj estas kvin knaboj kaj tri knabinoj, Togbe ankoraŭ en sia filozofio sukcesas sendi siajn filojn al lernejo kaj petas al la knabinoj resti hejme por la endomaj taskoj ĝis li sukcesos trovi la geedzojn por ili.

Agossi, la plej juna el la knabinoj, kreskante, ofte ĉagreniĝis kiam ŝi vidis siajn pli maljunajn fratinojn labori hejme ĉiutage. Ne akceptante vivi en la sama situacio kiel ŝiaj fratinoj, ŝi decidis forlasi siajn gepatrojn por iri al sia patrin-flanka onklo en alia proksima vilaĝo kun la espero plenumi siajn revojn studi en la lernejo.

Por plenumi la atendojn de Agossi, lia onklo Bossou enskribis ŝin ĉe la vilaĝa publika lernejo. La tago de ŝia enskribiĝo Agossi estis feliĉa, ĉar ŝia unua celo estis atingita. Tre feliĉa, ŝi studis diligente kaj rapide rimarkiĝis per sia inteligento. Ĉiuj admiris ŝin en la lernejo. Post bazlernejo kaj mezlernejo, ŝi ricevis stipendion kaj sukcese finis universitatan lertigadon pri ĵurnalismo dum 3 jaroj. Kun sia diplomo en la mano, ŝi trovis laboron kiel ĵurnalisto ĉe la radio-stacio de sia urbo.

Hodiaŭ ŝia tuta vilaĝo, ŝiaj gepatroj aŭdas ŝian voĉon per la elsend-programoj, kiujn ŝi prezentas, kaj ŝi tiel fariĝis modelo de sukceso tra sia regiono.

### **Globalvoices, interesa novaĵretejo**

**Globalvoices** nun estas tradukita al NAŭ lingvoj, interalie al Esperanto. Unu el la aferoj kiuj entuziasmigas pri verkado por [@globalvoices](https://eo.globalvoices.org) estas ke viaj vortoj estas transformataj en alian lingvon. Tio signifas, ke pli da homoj povas legi vian mesaĝon kaj ke ĝi ankaŭ kontribuas al plurlingva Interreto. Global Voices (Tutmondaj Voĉoj en Esperanto) estas redakcio kiu baziĝas sur tutmonda komunumo. Ni konstruas pontojn kaj tutmondan komprenon. Legu niajn rakontojn ĉi tie: <https://eo.globalvoices.org>.

**Herman D. Belgio**

# Kafujo

Justin Ndagijimana – Rutshuru

## 1. Laŭ speco de planto :

- **Arabiko:** milda gusto, arom-plena, malmulte da kafeino.
- **Robusto:** forta gusto, pli amara, pli da kafeino.
- **Liberiko:** fruktogusta, pli malof-ta.



## 1. Nutra graveco de kafo:

- **Natura stimulilo:** Pro la kafeino, ĝi helpas resti vigla kaj atenta.
- **Energia trinkaĵo:** Donas etan energion, utilan kiam oni estas laca.
- **Riĉa je anti-oksidoj:** Enhavas substancojn kiuj kontraŭbatalas ĉel-maljuniĝon.
- **Helpas metabolon:** Ĝi iomete plirapidigas la bruladon de kalorioj.

## 2. Medicina graveco:

- **Helpas preventi iujn malsanojn:** Modera konsumado povas redukti la riskon de kormalsanoj, diabeto kaj kelkaj kanceraj.
- **Favore al digestado:** Stimulas la stomakon kaj intestojn.
- **Mildigas kapdolorojn:** Kafeino estas foje uzata en kuraciloj kontraŭ migreno.
- **Plibonigas humoron** pro sia stimula efiko al la cerbo.

## 3. Kosilo:

Tro da kafo povas kaŭzi nervozon, sendormecon aŭ korbatakelon. Ne estas rekomendata por infanoj, gravedaj virinoj aŭ tre sentemaj personoj.

**Justin Ndagijimana** estas juna esperantisto el urbeto Kiwanja (Rutshuru), Norda Kivuo – DR Kongo, prizorganta nuntempe la klubon Rondo Esperantista de Kiwanja, R.E.K.

**Rete:** [jndagijimana19@gmail.com](mailto:jndagijimana19@gmail.com).

## Sumoo-legado multe kontribuas al la E-movado

*Tiu artikolo estis prenita el LEGAĴOJ, kun la permeso de ĝia redaktoro, Jindřiška Drahotová, Ĉefio).*

Libroj longe kuŝantaj en ŝranko vekiĝis. Multaj partoprenantoj jam finlegis tiujn dormintajn librojn kaj aĉetas la novajn. Laŭ statistiko, unu partoprenanto legas meznombre 60 paĝojn dum unu Sumo-okkurso. Dum 15 jaroj ekde septembro 2009 ĝis septembro 2024 okazis 89 Sumoo-oj, kaj entute estis 20 136 partoprenoj (la nombro de la partoprenintoj eble estis 1200), do la legitaj paĝoj estas  $60 \times 20\,136 = 1\,208\,160$  paĝoj (11 276 libroj kun 100 paĝoj).

**Laŭ informoj de Hori Jasuo.**

Mi estas verkisto kaj eldonisto. Se esperantistoj ne legas librojn, la verkista kaj eldonista laboro fariĝas tute senutila. Mi estas certa, ke ankaŭ aliaj verkistoj ĝojas pro Sumo-o. **JoDo.**





# Leciono pri la Svahila lingvo

## LA KLASO M-/WA-

**La klaso M-/WA-** (unua klaso) enhavas ekskluzive personajn nomojn, kaj plie du nomojn de bestoj. Ne ekzistas artikolo antaŭ substantivo, kaj ĝi povas esti difinita aŭ nedifinita:

Singularo: prefikso **M-**                      **MTU** = viro, la viro  
Pluralo:      prefikso **WA-**                      **WATU** = viroj, la viroj

➤ Antaŭ vokalo, la singulara prefikso **M-** fariĝas **MW-**:  
**MWALIMU** = instruisto, la instruisto.

➤ La plurala prefikso **WA-** fariĝas **W-**:  
**WALIMU** = instruistoj, la instruistoj.

### 1. KELKAJ SUBSTANTIVOJ DE LA KLASO M-/WA-

| SINGULO   | PLURALO    | TRADUKO AL E-O                   |
|-----------|------------|----------------------------------|
| Mdudu     | Wadudu     | insekto, insektoj                |
| Mfaransa  | Wafaransa  | franco, francoj                  |
| Mgeni     | Wageni     | gasto, gastoj, fremdulo(j)       |
| Mgonjwa   | Wagonjwa   | malsanulo, malsanuloj            |
| Mhindi    | Wahindi    | baratano, baratanoj, hindiano(j) |
| Mjerumani | Wajerumani | germano, germanoj                |
| Mjomba    | Wajomba    | onklo (patrina), onkloj          |
| Mke       | Wake       | edzino, edzinoj                  |
| Mkristo   | Wakristo   | kristano, kristanoj              |
| Mkulima   | Wakulima   | terkultivisto, terkultivistoj    |
| Mnyama    | Wanyama    | besto, bestoj                    |
| Mpishi    | Wapishi    | kuiristo, kuiristoj              |
| Msichana  | Wasichana  | juna knabino, knabinoj           |
| Mtoto     | Watoto     | infano, infanoj                  |
| Mtu       | Watu       | persono, personoj, homo, homoj   |
| Mtumishi  | Watumishi  | servisto, servistoj              |
| Mpagazi   | Wapagazi   | portisto, portistoj              |
| Mtumwa    | Watumwa    | sklavo, sklavoj                  |
| Mfalme    | Wafalme    | reĝo, reĝoj                      |
| Mganga    | Waganga    | kuracisto, kuracistoj            |
| Mseremala | Waseremala | ĉarpentisto, ĉarpentistoj        |
| Mchawi    | Wachawi    | sorĉisto, sorĉistoj              |

|                   |                    |                                          |
|-------------------|--------------------|------------------------------------------|
| <b>Mume</b>       | <b>Waume</b>       | edzo, edzoj                              |
| <b>Mvulana</b>    | <b>Wavulana</b>    | (juna viro), knabo, knaboj               |
| <b>Mwafrika</b>   | <b>Waafrica</b>    | Afrikanano, Afrikananoj                  |
| <b>Mwalimu</b>    | <b>Walimu</b>      | instruisto, instruistoj                  |
| <b>Mwana</b>      | <b>Wana</b>        | filo, filino, filoj, filinoj             |
| <b>Mwanadamu</b>  | <b>Wanadamu</b>    | homo (filo de Adamo), adamido            |
| <b>Mwanafunzi</b> | <b>Wanafunzi</b>   | studento, studentoj                      |
| <b>Mwanamke</b>   | <b>Wanawake</b>    | virino, virinoj                          |
| <b>Mwanaume</b>   | <b>Wanaume</b>     | viro, viroj                              |
| <b>Mwarabu</b>    | <b>Waarabu</b>     | arabo, araboj                            |
| <b>Mwingereza</b> | <b>Waingereza</b>  | anglo, angloj                            |
| <b>Mwislamu</b>   | <b>Waislamu</b>    | islamano, islamanoj                      |
| <b>Mwitalia</b>   | <b>Waitalia</b>    | italo, italoj                            |
| <b>Mwizi</b>      | <b>Wezi</b>        | ŝtelisto, ŝtelistoj                      |
| <b>Mzee</b>       | <b>Wazee</b>       | maljunulo, maljunuloj                    |
| <b>Mzungu</b>     | <b>Wazungu</b>     | blankulo, blankuloj, eŭropano, eŭropanoj |
| <b>Mfanyakazi</b> | <b>Wafanyakazi</b> | laboristo, laboristo                     |

## 2. KELKAJ ADJEKTIVOJ

|                 |            |               |              |
|-----------------|------------|---------------|--------------|
| <b>-baya</b>    | malbona(e) | <b>-dogo</b>  | malgranda    |
| <b>-zuri</b>    | bona, bela | <b>-ema</b>   | bona, afabla |
| <b>-zaifu</b>   | malforta   | <b>-zee</b>   | maljuna      |
| <b>-nene</b>    | dika       | <b>-vivu</b>  | mallaborema  |
| <b>-pole</b>    | milda      | <b>-kubwa</b> | granda       |
| <b>-aminifu</b> | fidela     |               |              |

## 3. KLASAJ AKORDOJ

### 1. Adjektivo:

La adjektivo prenas klasakordajn prefiksojn identajn al tiuj de la substantivo:

- Mtoto *mkubwa* / *mdogo* / *mzuri* / *mbaya* / *mwema* / ...

*granda* / *malgranda* / *bela* / *malbona* / *bona* / ... infano

- Watoto *wakubwa* / *wadogo* / *wazuri* / *wabaya* / *wema* / ...

*grandaj* / *malgrandaj* / *belaj* / *malbonaj* / *bonaj* / ... infanoj

### 2. Posedaj adjektivoj :

- Mtoto *wangu* / *wako* / *wake* / *wetu* / *wenu* / *wao*

= *mia* / *via* / *lia* / *nia* / *via* / *ilia* infano

- Watoto *wangu* / *wako* / *wake* / *wetu* / *wenu* / *wao*

= *miaj* / *viaj* / *liaj* / *niaj* / *viaj* / *iliaj* infanoj

#### 4. INTERRILATAJ PREPOZICIOJ : a= de, de la

##### *Ekzemploj*

|                                     |                                         |
|-------------------------------------|-----------------------------------------|
| <b>Mtoto mzuri wa mzungu</b>        | la bona infano de eŭropano              |
| <b>Watoto wazuri wa wazungu</b>     | la bonaj infanoj de eŭropanoj           |
| <b>Mpagazi mzaifu wa mgonjwa</b>    | la malforta portisto de la malsanulo    |
| <b>Wapagazi wazaifu wa wagonjwa</b> | la malfortaj portistoj de la malsanuloj |
| <b>Mwana mdogo wa mtumishi</b>      | la malgranda filo de la servisto        |
| <b>Wawana wadogo wa watumishi</b>   | la malgrandaj filoj de la servistoj     |

#### 5. EKZERCOJ

##### **1. Skribu la prefikson je la adjektivo kaj prepozicio de interrilatigo.**

|                                 |                                          |
|---------------------------------|------------------------------------------|
| Mwindaji .....baya ..... Mzungu | la malbona ĉasisto de la Eŭropano        |
| Mwalimu .....zee ..... mtoto    | la maljuna instruisto de la infano       |
| Mpishi .....nene ..... bwana    | la dika kuiristino de la mastro          |
| Mtumishi .....vivu ..... mganga | la maldiligenta servisto de la kuracisto |
| Mtu ....wivu .... sultani       | la viro ĵaluza de la estro               |
| Mwana ....zuri ..... seremala   | la bona infano de la ĉarpentisto         |
| Mke .....waminifu ..... mtu     | la fidela edzino de la viro              |

##### **2. Traduku en la suahilan:**

###### **a.**

Ludu! ..... Balau! ..... Eniru ! ..... Eliru ! ..... Kultivu! .....  
 Saltu! ..... Laboru! ..... Ne skribu! ..... Ne ludu! ..... Ne ploru! .....  
 Ne eniru! .....Ne saltu! ..... Ne eliru! .....

###### **b.**

Gasto ....., infano ....., edzo ....., viro....., virino ....., edzino  
 ....., anglo ....., kuiristo ....., instruisto ....., ŝtelisto ....., maljunu-  
 lo....., homoj ....., francoj ....., edzinoj ....., edzoj ....., onkloj .....

##### **3. Traduku en Esperanton:**

Mtu ....., mnyama ....., mdudu ....., mwanadamu ....., mwislamu ....., mkristo  
 ....., mzungu ....., mfaransa ....., mtoto ....., mvulana ....., msichana .....,  
 baba ....., kaka ....., mama ....., dada ....., mjomba ....., shangazi .....  
 walimu ....., wanafunzi ....., wanaume ....., wanawake ....., waitalia .....,  
 wageni ....., Wagonjwa ....., wapishi ....., wezi ....., rafiki ....., vijana .....

##### **4. Faru pluraln de tiuj nomoj:**

Mwanafunzi ....., mwislamu ....., mwana ....., mwizi ....., mzee ....., mzungu  
 ....., mhindi ....., mnyama ....., mume,....., mke ....., mwanamume  
 .....,mwanamke ....., mgeni ....., mwarabu ....., mwafrika ....., mjomba .....


## Le Congrès des Villes-pont The Congress of Bridge-Cities

Aperis interesa dulingva krimromano kiu celas diskonigi Esperanton al neesperantista mondo, mi lasas la verkinton Hannes Larsson paroli al ni pli: "Ni konstatas, ke la duono de la monda loĝantaro neniam aŭdis la vorton esperanto kaj la plimulto de la alia duono havas falsajn informojn pri ĝi. Kio furoras nuntempe? Krimromanoj kaj televidaj serioj kun titolo entenanta la vorton murdo. Filmon mi ne povas fari sed mi scias verki. Mi decidis verki krimromanon. En kiu lingvo? Ne en esperanto, ĉar tiun legos nur esperantistoj, sed ni volas informi la ne-esperantistan publikon pri la ekzisto kaj la mirindaj kvalitoj de nia lingvo...

Temas pri dulingva krimromano en kiu la vera ĉefrolulo estas esperanto. La leganto ricevas amason da informoj pri esperanto. Tiujn informojn li neniam legus en artikolo pri esperanto, sed nerimarkite li englutus ilin en krimromano. Mi elektis la francan kaj la anglan, du grandajn lingvojn; krome, la anglan studas homoj en la plej multaj landoj.

La libro aperos la 25an de Septembro, la titolo estas "Murder in Pont-à-Mousson" de la eldonejo Pegasus Elliot Mackenzie Ltd en Cambridge, Anglio".

Hannes Larsson, el Francio.



### Fabelo pri Muso kaj Leporo

Iam Muso kaj Leporo vojaĝis kune. Survoje la Leporo diris al la Muso: „Estus por mi granda plezuro scii vian nomon.“

„Mi estas Muso. Kaj vi?“

„Mia nomo estas La Gasto.“

Ili poste daŭrigas sian vojaĝon. Atinginte la vilaĝon, Muso kaj Leporo petis akvon kaj manĝaĵon. Ili ne salutis la vilaĝanojn antaŭ ol fari peton. Tamen knabino ilin salutis kaj alportis manĝaĵon.

„Ho, kara knabino mia, venu“, diris Leporo, „al kiu apartenas la manĝaĵo“.

„Al la gastoj“, respondis la knabino.

Tiam Leporo diris al Muso: „La manĝaĵo estas ne por vi, sed por mi. Nun mi manĝu. La knabino tuj alportos vian manĝaĵon al vi.“

Muso do restis malsatega. La postan tagon la knabino alportis alian manĝaĵon. Tuj la Leporo demandis: „Ĉu la manĝaĵo ne estas por la Gasto?“

„Jes ja! Ĝi estas por la Gasto.“

Leporo ankoraŭfoje manĝis ĉion. En la nokto Muso ne povis dormi pro sia malsatego. Ĝi pensis, ke li mortos pro malsato. Ĝi fine decidis iri al la kampoj de la vilaĝanoj por manĝi fruktojn. Tiel ĝi manĝis ĉiujn fruktojn de la vilaĝanoj. En la posta mateno la vilaĝanoj rimarkis, ke malaperis la fruktoj. Ili deziris konsulti voduon por trovi la kulpulon. La knabino diris al sia patrino, ke nur la Leporo manĝas. Tiam la patrino konkludis, ke la Muso estas la manĝinto de la fruktoj. Ekde tiu tago la homoj persekutas la musojn por mortigi ilin.

**Sylvie KANYERE NZILAMBA, Rutshuru - DR Kongo.**

(Tiu ĉi rakonto estis prenita el LEGAĴOJ, kun la permeso de Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio).